

## 06 ABSOLUTA PRUVO

"Sciu, Antoĉjo," diris enketjuĝisto Mates al sia plej intima amiko, "ĝi estas afero de sperto; mi kredas al neniuj elturniĝoj, neniun alibion kaj neniun rakontadon; mi kredas nek al akuzito, nek al atestantoj. Oni mensogas, eĉ se oni ne volas; do ekzemple iu atestanto ĵuras al vi, ke kontraŭ akuzito li ne havas ian malamikecon, kaj dume li mem ne scias, ke en la anim-profundo, sciu, en la subkonscio, li malamas lin pro ia subpremita malamo aŭ ĵaluzo. Ĉio, kion depozicias akuzito al vi, estas anticipa elpensita kaj artifa; ĉio, kion atestanto depozicias al vi, povas direktiĝi de konscia aŭ eĉ subkonscia intenco al akuzito helpi aŭ kulpogravigi. Mia kara, tion mi konas: homo estas tre mensogema kreitaĉo.

Al kio do mi kredas? Al hazardo, Antoĉjo; al la senintencaj, senvolaj aŭ, kiel diri tion, al nekontrolataj emocioj aŭ agoj aŭ vortoj, kiuj al oni iam tiam eskapas. Ĉio estas falsebla aŭ alĝustigebla, ĉio estas afekto aŭ ia plano, nur hazardo ne; ĝi estas unuavide ekkonebla. Mi havas jenan metodon: mi sidas kaj lasas homojn rakontaĉi, kion ili antaŭe elpensis kaj preparis; mi mienas, kvazaŭ mi kredus al ili, ankoraŭ mi helpas al ili, por ke ilia buŝo pli bone funkciu, kaj embuskas, ĝis eskapas de ili iu senintencan, nevolitan vorteton; sciu, por tio oni devas esti psikologo. Iu enketjuĝisto havas taktikon konfuzi akuziton; tial li senĉese enmiksigas en la parolon kaj embarasas lin tiel, ke tiu stultigito fine konfesas eble ankoraŭ tion, ke li murdis imperiestrinon Elizabetan. Mi volas absolutan certecon; tial lantete, pacience mi atendas, ĝis el la sistema mensogado kaj elturniĝado, kiun fake oni nomas depozicio, ekbrilas pretervola ereto da vero. Sciu, neta vero en ĉi tiu larma valo aperas nur pro misatento: nur se iu homa estaĵo iel parolperfidas sin aŭ mistrafas.

## 06 NAPROSTÝ DŮKAZ

"Víš, Toníku," povídal vyšetřující soudce Mates svému nejbližšímu příteli, "to je věc zkušenosti; já nevěřím žádným výmluvám, žádnému alibi a žádnému povídání; já nevěřím obviněnému ani svědkům. Člověk lže, i když ani nechce; tak třeba takový svědek ti přísahá, že proti obviněnému nechová žádné nepřátelství, a přitom sám neví, že ho v hloubi duše, víš, v podvědomí nenávidí z nějaké té potlačené nenávisti nebo žárlivosti. Všecko, co ti vypovídá obviněný, je předem vymyšlené a narafičené; všecko, co ti vypovídá svědek, se může řídit vědomým nebo i nevědomým úmyslem obviněnému pomáhat nebo přitížit. Holenku, to já znám: člověk je naskrz prolhaná potvora.

Čemu tedy věřím? Náhodě, Toníku; takovým těm mimovolným, bezděčným, nebo jakpak bych to řekl, nekontrolovaným hnutím nebo činům nebo slovům, které člověku tu a tam uklouznou. Všecko se dá falšovat nebo nastrojít, všecko je přetvářka nebo nějaký záměr, jenom náhoda ne; to se pozná na první pohled. Já ti mám tuhle metodu: sedím a nechám lidi brebentit, co si předem vymyslili a nachystali; dělám, jako bych jim věřil, ještě jim pomáhám, aby jim huba líp jela, a číhám, až z nich vyletí nějaké to bezděčné, nechtěné slovíčko; víš, na to musí být člověk psycholog. Některý vyšetřující soudce má taktiku obviněného splést; proto mu pořád skáče do řeči a zmate ho tak, že se mu ten janek nakonec přízná třeba i k tomu, že zavraždil císařovnu Alžbětu. Já chci naprostou jistotu; proto pomaloučku, trpělivě čekám, až mně z toho soustavného lhaní a vytáčení, kterému se odborně říká výpověď, blýskne mimovolný kousek pravdy. Víš, čistá pravda se v tomhle slzavém údolí vyskytne jenom z nedopatření: jen když se lidský tvor nějak podřekne nebo přehmátne.

Aŭdu, Antoĉjo, antaŭ vi mi havas neniujn sekretojn; ja ni estas amikoj ekde nia bubaĝo - vi scias, kiel oni batregalis min, kiam mi frakasis fenestron. Al neniuj mi tion dirus, sed mi tiom hontas pro io, ke ĝi devas eliĝi el mi; estas vane, oni bezonas konfesi. Mi diros al vi, kiel ĉi tiu mia metodo ĵus nun pruviĝis en mia... en mia plej privata vivo; koncize en mia edzeco. Kaj poste diru al mi, mi petas vin, ke mi estis idioto aŭ krudulo; mi meritas tion.

Homo, mi... nu, mi suspektis mian edzinon Marteta; mallonge, mi ĵaluzis kiel frenezulo. En mia kapo fiksiĝis, ke ŝi havas ion kun tiu... kun tiu juna... mi nomos lin Arturo; mi opinias, ke vi eĉ ne konas lin. Atendu, mi estas neniuj negro; se mi certe scius, ke ŝi amas lin, mi dirus, Marteta, ni disiros. Sed jen la plej malbona, neniujn certecon mi havis; Antoĉjo, vi eĉ ne scietas, kia turmento ĝi estas. Miadio, tio estis malbela jaro! Vi scias, kiajn stultaĵojn faras tia ĵaluza edzo: spionas, embuskas, enketas servistinojn, faras scenojn... Kaj nun imagu al vi, ke mi estas hazarde enketjuĝisto; homo, mia familia vivo dum la lasta jaro, tio estis konstanta kruc-enketado de mateno ĝis... ĝis rea enlitiĝo.

La akuzitino, mi volas diri Marteta, kondutis brile; eĉ kiam ŝi ploris, ankaŭ kiam ŝi ofendite silentis, kaj kiam ŝi rakontis, kie ŝi dum la tuta tago estis kaj kion ŝi faris, vane mi gvatis, ke ŝi iel senvole konfesos ion aŭ parolperfidos sin. Sciu, ŝi mensogis ofte al mi, mi volas diri, ŝi mensogis ordinare, sed tio jam estas tia virina kutimo; virino ne diros al vi ĝuste, ke ŝi estis du horojn ĉe modistino - ŝi elpensas, ke ŝi estis ĉe dentisto aŭ en tombejo ĉe tombo de la panjo. Ju pli mi turmentis ŝin - Antoĉjo, ĵaluza viro, tio estas pli malbona ol rabia hundo - ju pli mi ŝin tiranaĉis, des malpli da certeco mi havis. Ĉiun ŝian vorton, ĉiun ŝian elturniĝon mi dekfoje inversigis kaj sekcis; sed mi trovis nenion, nur la kutimajn intencajn duonverojn kaj duonmensogojn, el kiuj konsistas la normala homa kontakto kaj la edzeco speciale, nu vi scias.

Poslechni, Toníku, já před tebou nemám žádné tajnosti; jsme přece kamarádi od klukovských let – vždyť víš, jak ti nařezali, když já jsem rozbil okno. Nikomu bych to nepovídal, ale já se ti tak za něco stydím, že to musí ze mne ven; to je marné, člověk se potřebuje zpovídat. Já ti řeknu, jak se mně ta má metoda zrovna teď osvědčila v mém... v mém nejsoukromějším životě; zkrátka v mém manželství. A pak mně řekni, prosím tě, že jsem byl blbec a hrubec; patří mně to.

Človče, já... no, já jsem podezíral svou ženu Martičku; zkrátka žárlil jsem jako blázen. Já jsem si ti vzal do hlavy, že má něco s tím... s mladým tento... já ho budu jmenovat Artur; já myslím, že ho ani neznáš. Počkej, já nejsem žádný negr; kdybych věděl jistě, že ho miluje, řekl bych, Martičko, rozejdeme se. Ale to je to nejhorší, já jsem žádnou jistotu neměl; Toníku, nemáš ponětí, jaká to jsou muka. Hergot, to byl šeredný rok! To víš, jaké voloviny takový žárlivý manžel provádí: stopuje, číhá, služby vyslýchá, scény dělá... Ale teď si vem, že jsem náhodou vyšetřující soudce; človče, můj rodinný život za poslední rok, to byl ustavičný křížový výslech od rána až... až zase do postele.

Obviněná, chci říci Martička, se držela skvěle; i když plakala, i když uraženě mlčela, i když vypovídala, kde po celý den byla a co dělala, pásl jsem nadarmo po tom, že se nějak podřekne nebo prozradí. To víš, lhala mně často, chci říci, lhala obyčejně, ale to už je takový ženský zvyk; ženská ti ani pořádně neřekne, že byla dvě hodiny u modistky – vymyslí si, že byla u zubaře nebo na hřbitově u mamínčina hrobu. Čím víc jsem ji trápil – Tondo, žárlivý chlap, to je horší než vzteklý pes – čím víc jsem ji kujonýroval, tím míň jistoty jsem měl. Každé její slovo, každou její vytáčku jsem desetkrát obracel a kuchal; ale nenašel jsem nic než ty obyčejné záměrné polopravdy a pololži, ze kterých pozůstává normální lidský styk a manželství zvlášť, no vid'.

Mi scias, kiel estis ĉe tio al mi, sed konsiderante, kion dume suferis povrulino Marteta, homo, plej ŝate mi vangofrapus min. Do nunjare veturis Marteta al Frantiŝkovy Lázně - sciu, la virinaj aĵoj kaj tiel, mallonge ŝi aspektis mise. Memkomprene, mi igis ŝin gardi - ian fian ulon mi salajris, kiu cetere tie nur sidaĉis en gastejoj... Estas strange, kiel la tuta vivo koruptiĝas, se io kun vi en iu sola afero ne estas en ordo; oni estas tute malpura, se oni havas makulon sur alia loko. Marteta skribis al mi... iel tiel necerte kaj timide... kvazaŭ ŝi ne scius pri kio; memkomprene, la leterojn mi analizaĉis kaj serĉis inter linioj... Do foje mi ricevis de ŝi leteron, adreso estis 'Francisko Mates, enketjuĝisto' kaj tiel plu; kaj malferminte ĝin kaj eliginte ŝian leteron, mi vidas titolon: 'Kara Arturo!'

Homo, miaj manoj sinkis. Do jen fine ĝi estas. Okazas iam, kiam oni skribas plurajn leterojn, ke oni ilin mise enkonvertigas. Sciu, Marteta, kia stulta hazardo, ĉu? Knabo, preskaŭ mi ŝin kompatis, ke tiel ŝi donis sin en miajn manojn.

Ne opiniu, Antoĉjo, mia unua penso estis, ke la leteron, destinitan al... al tiu Arturo, mi ne legu kaj resendu al Marteta; ĉiukaze mi farus tion, sed la ĵaluzo estas malpura pasio kaj fiaĵo; amiko, la leteron mi tralegis kaj montros ĝin al vi, ĉar mi ĝin kunportas. Do rigardu, kio enestas:

Kara Arturo,

ne koleru, ke ankoraŭ mi ne respondis al vi; sed mi havis zorgojn, ke Francjo - "tiu do estas mi, ĉu vi komprenas?" - tiel longe ne skribis; mi scias, ke li havas multe da laboro, sed kiam oni estas tiel longe sen informoj pri sia edzo, oni iradas do kiel korpo sen animo; sed tion vi, Artuĉjo, ne komprenas. Venontan monaton Francjo alveturos ĉi tien, do ankaŭ vi povus tien ĉi alveni. Li skribas al mi, ke nun li havas tre interesan kazon, sed ne skribis kion, mi opinias, ke ĝi estas la murdo fare de Hugo Müller; tio min tre ege interesus. Tiom mi bedaŭras, ke Francjo iom fremdiĝis al vi, sed nur tial, ĉar li havas multe da laboro;

Já vím, jak přitom bylo mně; ale když tak povážím, co přitom zkusila chudák Martička, tak bych si, člověče, nejraději nafackoval. Tak letos jela Martička do Františkových Lázní – to víš, ty ženské věci a tak, zkrátka vypadala špatně. To se ví, já ji tam nechal hlídat – takového mrzkého chlapa jsem platil, který se tam ostatně válel jen po hospodách... To je zvláštní, jak se celý život korumpuje, když to v jedné jediné věci s tebou není v pořádku; jsi celý nečistý, máš-li na jediném místě skvrnu. Martička mně psala... tak nějak nejistě a zakřiknutě... jako by nevěděla o čem; to se rozumí, já jsem se v těch dopisech šťoural a hledal mezi řádky... Jednou teda jsem od ní dostal dopis, adresa byla ‚František Mates, vyšetřující soudce‘ a tak dále; a když to otevru a vyndám její list, vidím nadpis: Drahý Arture!

Člověče, mně klesly ruce. Tak tady to konečně je. To se tak někdy stane, když člověk píše víc dopisů, že je strčí do nepravých obálek. Vid', Martičko, to je hloupá náhoda, co? Až mně jí, hochu, bylo líto, že se mně tak vydala do rukou.

Nemysli si, Toníku, mé první hnutí bylo, abych ten dopis, určený tomu... tomu Arturovi, ani nečetl a poslal jej zpátky Martičce; já bych to v každém případě udělal, ale žárlivost je špinavá vášeň a svinstvo; kamaráde, já jsem si ten dopis přečetl a já ti jej ukážu, protože jej nosím s sebou. Tak se podívej, co v něm je:

Drahý Arture,

nehněvejte se, že jsem Vám dosud neodpověděla; ale měla jsem starosti, že mně Franci – to teda jsem já, rozumíš? – tak dlouho nepsal; já vím, že má mnoho práce, ale když je člověk tak dlouho beze zpráv o svém muži, tak chodí jako tělo bez duše; ale tomu Vy, Arturku, nerozumíte. Příští měsíc sem Franci přijede, tak byste sem mohl přijet také. On mi píše, že má teď moc zajímavý případ, ale nenapsal co, já myslím, že to je ta vražda Hugona Müllera; mne by to strašně zajímalo. Mně je tak líto, že se Vám Franci trochu odcizil, ale to je jen proto, že má tak mnoho práce;

se estus kiel iam, vi povus lin preni inter homojn aŭ aŭte ekskursi. Ĉiam vi estis al ni tiel bona kaj ankaŭ nun vi ne forgesas, kvankam ĝi ne estas tia, kia ĝi devus esti; sed li, Franĉjo, estas tiel nervoza kaj stranga. Ankaŭ vi ne skribis al mi, kion faras via knabinjo. Franĉjo ankaŭ plendas, ke en Prago estas ega varmo; li devus veturi ĉi tien kaj senŝarĝiĝi, sed certe li sidas ĝisnokte en oficejo. Kiam vi veturos al maro? Mi esperas, ke vi kunprenos vian knabinjon; vi ne scias, kio estas, se ni virinoj nostalgias. Kore vin, Artuĉjo, salutas via Marta Matesová

Do, Antoĉjo, kion vi diras al tio? Mi scias, ĝi estas neniel sprita letero; ĝi estas tute malforta faro laŭ vidpunkto stila kaj de interesajo; sed, homo, kian lumon ĝi ĵetas je Marteta kaj ŝia rilato al tiu povrulo Arturo. Neniam mi tiom kredus al ŝi, eĉ se ŝi dirus ion ajn; sed ĉi tie mi havis en la mano ion tiel senintencan, tiel preter ŝia volo... Do vidu, ke la vero, netrompa kaj senduba, aperas nur pro misaranĝo. Mi estus plorinta pro ĝojo - kaj same pro honto, ke tiel stulte mi ĵaluzis.

Kion poste mi faris? Nu, per ŝnureto mi ligis aktojn pri murdo fare de Hugo Müller, fermis ilin en tirkeston kaj tagon poste mi estis en Františkovy Lázně. Kiam Marteta min ekvidis, ŝi ekruĝis kaj ekbalbutis kiel knabineto; ŝi aspektis, kvazaŭ ŝi farus ion teruran. Mi nenion. Franĉjo, diris post momento Marteta, ĉu vi ricevis mian leteron? - Kian leteron, mi miras. Vi skribas al mi diable malmulte.

Marteta rigardas min embarasite kaj elspiras, kvazaŭ ŝi senŝarĝiĝus. Do versimile mi forgesis sendi ĝin al vi, ŝi diris kaj estis serĉanta en mansaketo, ĝis ŝi eltiris ian iom ĉifitan folion. Ĝi komenciĝis per vortoj: ‚Kara Franĉjo!‘ Mi devis ridi en mia animo. Sinjoro Arturo versimile jam resendis, kio ne apartenis al li.

Poste eĉ ne unu vorto estis dirita pri tio; memkomprene mi komencis rakonti al ŝi pri la krimo de Hugo Müller, kiu ŝin tiom interesis. Mi opinias, ke ĝis nun ŝi kredas, ke la leteron mi nepre ne ricevis.

kdyby to bylo jako dřív, mohl byste ho vytáhnout mezi lidi nebo autem na výlet. Vy jste k nám vždycky býval tak hodný a ani teď nezapomínáte, třebaže to není tak, jak by to mělo být; ale on je Franci tak nervózní a divný. Ani jste mi nepsal, co dělá Vaše dívka. Franci si také naříká, že je v Praze strašně horko; měl by jet sem a vypřáhnout, ale on jistě sedí až do noci v úřadě. Kdy pojedete k moři? Doufám, že vezmete svou dívku s sebou; Vy nevíte, co to je, když se nám ženským stýská. Srdečně Vás, Arturku, zdraví Vaše Marta Matesová.

Tak, Toníku, co tomu říkáš? Já vím, že to není žádný duchaplný dopis; je to docela slabý výkon po stránce stylu a zajímavosti; ale člověče, jaké to vrhá světlo na Martičku a na její poměr k tomu chudáku Arturovi! Nikdy bych jí nebyl tak věřil, kdyby mně říkala co chtěla; ale tady jsem měl v ruce něco tak bezděčného, tak mimo její vůli... Tak to vidíš, že pravda, neklamná a nepochybná pravda se zjeví jenom nedopatřením. Já bych byl brečel radostí – a přitom hanbou, že jsem tak pitomě žárlil.

Co jsem potom udělal? Inu, svázel jsem provázkem akta vraždy Hugona Müllera, zavřel je do zásuvky a den nato jsem byl ve Františkových Lázních. Když mě Martička uviděla, začervenala a zajíkla se jako holčička; vypadala, jako by provedla něco hrozného. Já nic. Franci, povídá za chvíli Martička, dostal jsi můj dopis?

Jaký dopis? divím se. Ty mi toho píšeš po čertech málo.

Martička se na mne zaraženě dívá a vydechne, jako by se jí ulevilo. Tak já jsem ti jej asi zapomněla poslat, řekla a hrabala se v taštičce, až vylovila takový trochu zmuchlaný list. Začínal slovy: Drahy Franci! Musel jsem se v duchu smát. Pan Artur už asi obratem vrátil, co mu nepatřilo.

Pak už o tom nepadlo ani slovo; to se rozumí, začal jsem jí vykládat o tom zločinu Hugona Müllera, který ji tak moc zajímal. Myslím, že podnes věří, že jsem ten dopis vůbec nedostal.

Nu, kaj jen ĉio; de tiu tempo estas almenaŭ ĉe ni trankvilo. Diru, ĉu mi ne estas idioto, ke mi tiel krude ĵaluzis? Sciu, nun mi klopodas al Marteta tion kompensi; nur el la letero mi vidis, kiel ŝi, povrulino, zorgas pri mi. Do nun ĝi estas ekstere; oni pli hontas pro sia stulteco ol pro siaj pekoj. Sed jen klasika ekzemplo, kian pruvoforton havas tia absoluta kaj senvola hazardo, ĉu?"

Proksimume en la sama momento diris juna viro, ĉi tie nomata Arturo, al sinjorino Marteta: "Nu, knabinjo, ĉu ĝi helpis?"

"Kio, karulo?"

"Tiu letero, kiun vi tiam kvazaŭ misatente sendis al li."

"Helpis," diris sinjorino Marta kaj enpensiĝis. "Sciu, knabo, mi eĉ hontas, kiel li, Franĉjo, tiom ege kredas al mi. Ekde tiu tempo li estas je mi tiel bona... La leteron li senĉese portas sur sia koro." Sinjorino Marta ekstremis. "Ĝi estas fakte terura, ke... ke mi lin trompas, ĉu vi ne opinias?" Sed sinjoro Arturo tion ne opiniis; almenaŭ li asertis, ke nepre ne.

No, a to je ĉiĉo; od té doby je u nás aspoň pokoj. Řekni, nebyl jsem blbec, že jsem tak sprostě žárlil? To víš, teď to hledím Martičce vynahradiť; teprve z toho dopisu jsem viděl, jak se chudáček o mne stará. Tak, teď už je to venku; člověk se víc stydí za svou pitomost než za své hříchy. Ale to máš klasický příklad, jakou průkaznou sílu má taková čirá a bezděčná náhoda, že?"

Přibližně v téže době řekl mladý muž, zde nazývaný Arturem, paní Martičce: "Tak co, holčičko, pomohlo to?"

"Co, miláčku?"

"Ten dopis, cos mu tehdy jako nedopatřením poslala."

"Pomohlo," řekla paní Marta a zamyslela se. "Víš, hochu, já se ti až stydím, že mně on, Franci, teď tak hrozně věří. On je na mne od té doby tak hodný... Ten dopis ti pořád nosí na srdci." Paní Marta se zachvěla. "Je to vlastně strašné, že... že ho tak klamu, nemyslíš?" Ale pan Artur to nemyslel; aspoň tvrdil, že rozhodně ne.